# Sennaciulo

Oficiala organo de sennacieca asocio tutmonda

Decembro 2003 MENSUEL/MONATA 74-a jaro, n-ro 12 (1182)

ISSN 1163.0442

**Pri la enhavo de artikoloj respondecas la aŭtoroj mem**

5 €

**http://www.sat-esperanto.org/ *** retadreso: satesper@noos.fr**


# *SAT AKTIVE PARTOPRENIS EN EŬROPA SOCIA FORUMO*








*Supra foto: Granda banderolo de SAT en la franca, sur placo de Bastilo.*
*Suba foto: En la defileo ni portis videble la vorton - ESPERANTO.* *Fotis: K. Barkoviĉ*

**SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI**

# El la redaktejo...




*Karaj,*
*vi tenas en la manoj la lastan numeron 2003. En ĝi vi trovos multajn interesajn informojn pri la aktiveco de via Asocio.Espereble tio instigos vin al ankoraŭ pli granda subteno kaj aktivado kadre de SAT.*
*Aliĝu al la venontjara kongreso en Bratislava. Frua aliĝo helpas al la OKK. Ne atendu la lastan momenton.*
*Aĉetu librojn kaj diskonigu ilin (vidu liston apude!). La tria tasko de SAT estas klerigi siajn membrojn pere de valoraj eldonaĵoj. Se ili ne estas legataj, ili estas morta kapitalo. Jen do belaj donacoj okaze de jarfinaj festoj.*
*Okaze de la jarŝanĝo mi deziras al ĉiuj el vi sanon kaj pacon por povi normale aktivi laŭ la celoj de SAT.*
*Kore via,*

*Redaktoro*

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
Retadreso: satesper@noos.fr.
TTT-paĝoj:
http://www.sat-esperanto.org
Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin kaj K. Barkoviĉ.
Ĉefredaktoro : Kreŝimir Barkoviĉ
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.
*
Imprimé par : S.I.B., B.P. 343, FR-62205 Boulogne-sur-Mer Cedex, Francio.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication: Jacques SCHRAM
Abonnement annuel/jara abono France 55,
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution.
Commission Paritaire n° AS-74399
Limdato por ricevo de kontribuaĵoj estas ĉiam la 10-a en la monato.

**SAT-LIBROLISTO**



| TITOLO | | PREZO en Eŭroj | |
|---|---|---|---|
| Communication linguistique | | 4,60 | |
| Diction. de poche | | 4,30 | |
| Diction. pratique | | 23,00 | |
| Grand Dict. Esp. Fran. | | 23,00 | |
| Historio de SAT | | 4,60 | |
| Infanoj de la malriĉuloj | | 4,60 | |
| Interesa arkeologio | | 4,60 | |
| Japanaj vintraj fabeloj | | 7,00 | |
| Junulkurso | | 6,10 | |
| Junulkurso-kasedo | | 6,90 | |
| Komentoj al Komunista manifesto | | 1,25 | |
| Komentoj JK-francaj | | 1,25 | |
| Komentoj JK-hispanaj | | 1,25 | |
| Kristanismo kaj patriotismo | | 1,25 | |
| La fremdulo | | 9,15 | (nova) |
| La kolektiveco | | 6,10 | |
| Laborista movado Esperantista antaŭ mondmilito | | 1,25 | |
| Lanti pri sennaciismo | | 1,25 | |
| Manifesto de sennaciistoj | | 1,25 | |
| Natura nutrado | | 1,25 | |
| Ne plu ludo | | 3,80 | |
| Nia teatro | | 1,25 | |
| Nouveau Cours Rat. | (bind.) | 9,50 | |
| Nouveau Cours Rat. | (broŝ.) | 8,40 | |
| Nouveau Cours Rat. Kasedo | | 6,90 | |
| Nuna stato de evoluismo | | 2,80 | |
| Petro | | 1,50 | |
| PIV | | 40,00 | |
| Nova PIV | | 70,00 | |
| Poemo de plugisto | | 1,25 | |
| Profeto | | 1,25 | |
| PV | | 23,00 | |
| Revolucio de Ĉinio | | 3,80 | |
| SAT-ana anĝelo | | 6,10 | |
| Scienco kaj pseŭdoscienco pri heredoj kaj raso | | 1,25 | |
| Sepmil tagoj en Siberio | | 22,00 | |
| Skizo de ekonomia... | | 2,30 | |
| Une humanité, une langue | | 2,30 | |
| Universalismo | | 10,00 | (nova) |
| Vivo de Lanti | | 11,50 | |
| Vojo al scienco de estonto | | 1,25 | |
| Vortoj de kamarado Lanti | | 2,80 | |
| Vualo de l'Silento | | 10,70 | (nova) |
| Ĉu socialisma libereco ... | | 1,25 | |

**Por libroservoj jena rabato :**
PIV kaj eldonoj de SAT-Amikaro : 25 %
Aliaj SAT-eldonoj : 30 %

Por mendoj el la landoj de Eŭropa komunumo ni devas fakturi francan takson **se ili ne posedas numeron AVI.**

ACETU

KAJ

LEGU

SAT-ELDO-NAĴOJN

***

TROVU JAR-FINAN DONA-CON POR VIAJ AMIKOJ

***

SAT VIVAS KAJ AK-TIVAS DANKE AL VIAJ AĈETOJ



ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ

Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la reto en la formato de teksto aŭ sur la disketoj en la formatoj de Word, Apple (Claris)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn tekstojn per la sistemo x (cx = ĉ, sx=ŝ ktp) ĉar tio ebligas al ni facile transformi la tekston en normalan Esperanton. Se vi sendas tekstojn surpapere, vi tajpu ilin normale. Dankon.

La Redakcio

# Kelkaj pridiskutindaj herezaĵoj pri la estonteco de SAT

*Jen pripensoj de nia juna kamarado kiu deziras provoki diskuton pri la estonto kaj pri liaj proponoj. Ni invitas vin ĉiujn reagi kaj esprimiĝi antaŭ nia kongreso en Bratislavo. Viaj reagoj aperos en venontaj numeroj de Sennaciulo kaj servos kiel bazo por la kongresa debato.*

*La redakcio*

SAT celas ebligi al siaj membroj elekti la plej taŭgan vojon por forkonduki la homaron al kiel eble plej alta ŝtupo de civilizo kaj kulturo, per anstataŭigo de la nuna fia kaj fuŝa sociordo per alia bazita sur la jena principo, entenata en la universale malrespektata deklaracio pri homaj rajtoj : ĉiu homo ricevu tion, kion li bezonas por dece vivi, tio estas sufiĉa manĝaĵo, varma loko por dormi, ebleco sin kuraci kaj ebleco kleriĝi. Ne necesas longe prelegi pri la nuna monda situacio por konstati, ke tio ankoraŭ ne okazas en iu ajn lando. Pri tio kulpas la liberalisma-kapitalisma sistemo, kiu detruas nian planedon je la nomo de profito. Pri tio ankaŭ kulpas ĉiuj, kiuj akceptas tiun situacion, kaj faras nenion por ŝanĝi ĝin. La plej terura afero estas, ke ni nun disponas pri ĉiuj teĥnikaj rimedoj por havigi al ĉiu homo la elementajn necesaĵojn, pri kiuj mi parolis pli supre. Sed oni preferas forĵeti nevenditajn fruktojn ol donaci ilin al homoj, kiuj ne kapablas pagi. Tio ŝanĝiĝos nur post kiam okazos du gravaj revolucioj (tio estas drastaj ŝanĝegoj). La unua estas transiro de kapitalismo al vera anarĥia komunismo, kiu estis la komuna celo de ĉiuj maldekstruloj, almenaŭ dum la dua duono de la deknaŭa jarcento. Sed la historio pruvis, ke tiu ĉi revolucio estos ebla nur post la transformiĝo de la homa menso. Kiam ni ĉiuj komprenos, ke ni pli gajnos per kunlaboro ol per ĉikanado kaj militoj, la homaro estos savita. Por tio tute ne necesus forigi el la homa spirito la kverelemon, la egoismon, la kruelecon, la masoĥismon kaj ĉiujn imageblajn malvirtojn, kiujn Sigmund Freŭdo nomis « mortigaj instinktoj ». Kant humure asertis, ke eĉ la plej fiaj homoj povus vivi pace, kondiĉe ke ili estu inteligentaj. Kaj jen venas la tasko por ni SAT-anoj : komprenigi al ĉiuj fiuloj en la mondo, ke eĉ ili estos pli feliĉaj en socialisma mondo.

Por tion komprenigi al ili, necesus tamen scii, kion ni nomas « socialismo » aŭ « alia mondo », se uzi la nun laŭmodan esprimon. Kaj ĉefe necesus scii kiel starigi tiun pli bonan mondon. Ofte mi havas la impreson, ke la nunaj progresemaj organizoj multe batalas kontraŭ la nuna sociordo, sed ne proponas verajn konkretajn solvojn al la problemoj. Ĉiuokaze ekzistas amaso da organizoj kaj individuoj, kiuj iel klopodegas por plibonigi la mondon, sed ili ofte ne estas efikaj, ĉar ili ne konas aŭ ignoras siajn alitendencajn samcelanojn.

Kiel konkrete ŝanĝi la nunan mondon ? Jen la demando, kiun mi longe faris al mi mem kaj al aliaj homoj, sen iam ricevi kontentigan respondon. Mi nun konvinkiĝis, ke ni atingos neniun rezulton per uzo de perforto. Tion pruvis la dramaj eventoj de la dudeka jarcento: se ni estos tro indulgaj kun niaj malamikoj, ili mortigos nin, kiel okazis dum la Pariza Komunumo. Por venki ilin, ni devos esti pli fiaj ol ili, sed tiam nia venko estos tiu de barbareco, kaj ne de socialismo. La nura alia solvo estas edukado de la homoj, por ke ĉiuj bone komprenu, ke ili havas komunajn interesojn. Ŝajnas al mi, ke tiu dua vojo estas perfekte difinita per la unua paragrafo de la statuto de SAT. Do, kial ĉiuj progresemuloj ne kuregas al ni ? Ofte pro nescio, ofte ankaŭ, ĉar ili ne komprenas, kiel SAT povus plenumi sian statutan celon. Kaj evidente ne estas facile altiri homojn dirante al ili « venu al tiu mirinda asocio, per kiu eblus savi la mondon, se ni estus pli multnombraj kaj havus pli grandajn rimedojn ». Se ni vere volas sukcesi, ni devas pripensi por scii kion ni jam povas fari kun niaj limigitaj eblecoj. Kaj se ni tion faros vere taŭge, ni ne plu bezonos klopodi por altiri homojn. Ili venos propravole, pro la konstato, ke ni trovis la ĝustan vojon kaj komencis paŝi sur ĝi.

Do, konsentite, sed kion vi proponas, kara kamarado ? Unu el la ĉefaj trajtoj de nia mondo estas la superabundo de diversaj informoj. Teorie, ni facile povus esti informitaj pri ĉiuj okazaĵoj en la mondo, sed plej ofte ni ne scias, kie trovi la serĉatan informon. Mi mem, bonŝanculo, kiu studas en unu el la plej bonaj lernejoj de mia lando, kaj disponas pri mirinda kvanto da plej diversaj klerigiloj, tute ne kapablas precize respondi al la jenaj simplaj demandoj : kion bezonas la homaro, kion ni kapablas produkti, kaj kial la produktaĵoj ne alvenas al tiuj, kiuj bezonas ilin. Por tio mi bezonus ekvivalenton de PIV pri ekonomio kaj politiko. Por tio la plej racia rimedo estas la reto.

### Utileco de la reto

1. Por starigi koheran kolekton da informoj, facile alireblan al ĉiuj, sub iuj kondiĉoj.

Informoj pri faktoj, kaj pri teorioj: kio estis jam provita por alvenigi la bezonaĵojn al la bezonantoj, kial tio ne funkciis. Alivorte ĉio necesa pri la ĝisnunaj politikaj kaj ekonomiaj sistemoj. Tia kolekto da informoj devus enteni ĉiujn necesajn informojn aŭ referencoj pri verkoj necesaj, por definitive ĉesigi ĉiujn polemikojn

ĉirkaŭ nocioj, kiujn ne ĉiuj komprenas sammaniere, aŭ erare laŭdas aŭ kritikas pro manko de informoj.

Tio povus ankaŭ troviĝi, sub pli ordigita, kaj sekve pli facile uzebla formo. Ĉiuj informoj pri laboristaj luktoj, kiuj ĝis nun aperas en Sennaciulo, estas tro malgrandkvantaj.

Jam ekzistas la reta Vikipedio, tute ne kompleta, sed kiu povus esti bona laborbazo. Tamen ĝi ne apartenas al SAT, kaj necesas pripensi, ĉu ĝia strukturo estas la plej taŭga. Ĉiuokaze ni povus kontribui al ĝi, kaj reuzi la artikolojn aliloke, ĉar temas pri libera enciklopedio.

2. Por simpligi administrajn aferojn.

Por dissendi administrajn informojn, anoncojn kaj petojn al la tuta membraro.

Por la adresaro, kiu tiam ĉiam estus aktuala kaj facile ĝisdatigebla. Tio ŝparigus multan tempon al Kreŝo, kaj faciligus la rilatojn inter la membroj.

3. Por disvastigi beletrajn verkojn. Ni ja bezonas artistojn, ĉar ili devigas nin pripensi pri fundamentaj demandoj, kaj atentigas pri bazaj veroj, kiun la raciemaj teoriistoj foje forgesas. Ni povus enretigi ĉiujn malnovajn eldonaĵojn de SAT, kiuj ankoraŭ estas legindaj, sed kiujn ni ne povas reeldoni pro financaj kialoj. Per tiu metodo ni ankaŭ povus disvastigi la originalajn verkojn kaj tradukojn de diversaj nunaj aŭtoroj, kiuj ne trovis eldoniston.Tio liberigus nin de administraj tedaĵoj ligitaj al eldonado de libroj. Tamen tio ne signifas, ke oni devige rezignu pri eldono de "paperaj libroj". Oni povus krei mendoliston, kaj ekigi la paperan eldonadon kiam estos sufiĉe da mendoj.


4. Por akiri pliajn membrojn. Ofte la prezo de la kotizo estas obstaklo por multaj, kiuj jam estas membroj de diversaj asocioj, aŭ simple ne havas monon (junuloj, senlaboruloj, senpensiaj emeritoj, laboristoj, kiuj apenaŭ ricevas sufiĉan salajron por sin vivteni...). Jam multaj nur pagas simbolan kotizon, kaj SAT ĉiuokaze vivas ĉefe danke al donacoj. Tio estus simpla oficialigo de la ĝis nun ofte aplikita principo de interkamarada solidareco : tiuj, kiuj kapablas pagi, pagu, la aliaj profitu, kaj iel repagu kiam ili povos, aŭ elturniĝu kun sia konscienco. Krome multaj el la aktivaĵoj, kiujn mi proponis, kostus nenion al la asocio krom taŭga komputila materialo. Kaj tiun materialon SAT jam akiris pere de donacoj !


Tiuj proponoj estas konkrete iom post iom realigeblaj per niaj nunaj rimedoj. Ili necesigas nenion krom iom da bonvolemo flanke de ĉiu el ni, aŭ pli ĝuste de ĉiu, kiu disponas pri retaliro. Mi konscias, ke tio koncernas nur malgrandegan parton de la homaro kaj de nia membraro. Sed mi ankaŭ scias, ke tiuj, kiuj ne havas monon por akiri tiajn aferojn ofte troviĝas en tiel malbona situacio, ke ili tute ne pensas pri SAT-agado. Iliaj ĉiutagaj materiaj zorgoj ofte ne lasas al ili tempon nek monon por aktivi en iu ajn movado. Oni ne bone pripensas kiam oni devas zorgi pri la plenigo de sia stomako aŭ kun la timo esti forpelita el sia kuŝejo. Tiuj, kiuj ne disponas pri retaliro, sed havas sufiĉan energion kaj agemon ĉiuokaze povas elturniĝi per la helpo de aliaj homoj. Kaj se ilia SAT-laboro estos vere efika, tiu solidara helpo ankaŭ profitos al la helpinto, kiu disponigis sian propran informadikan materialon. Krome tiuj, kiuj ne disponas pri retaliro plene rajtas verki por Sennaciulo, kaj laŭ la konstantaj plendoj de Kreŝo, mi supozas ke tiuj homoj ne estas tre aktivaj en nia asocio.

Kio restus en Sennaciulo, se ni forigus ĉiujn anoncojn kaj pure informajn tekstojn ? Restus grandega spaco por analizi ĉiujn kolektitajn informojn, kaj debati pri la taŭga maniero agadi por draste transformi nian socion. Kaj se ni vere sukcesos starigi ampleksan kaj fidindan informkolekton, ni havos multe da laboro por analizi ilin. El tiu grandega idea kirlado ĉefe eliros kelkaj gravaj ideoj, same kiel la Enciklopedio de la jarcento de la Lumoj naskis la Francan Revolucion.

Vinko Markov




*MONATO DE ESPERANTA-LIBRO *****DONACU KAJ LEGU ILIN !!!*

# EŬROPA SOCIA FORUMO SAT PARTOPRENIS

Merkrede, la 12-an de novembro 2003, ni disdonis pli ol mil flugfoliojn dum komenco de ESF en Villette-Halego. Partoprenis anoj de FET, JEFO kaj UFE. Iom antaŭe muntiĝis budoj de FET-UFE-JEFO kaj E-95-EDE. Tiu de SAT SAT-Amikaro muntiĝis ĵaŭde matene.


*Budo de SAT kaj SAT-Amikaro* *Foto: H. Masson*

Ĵaŭdon, la 13-an, vendredon la 14-an kaj sabaton matene la 15-an, la budoj de FET-UFE-JEFO en Parizo kaj tiuj de SAT-SAT-Amikaro kaj de E-95-EDE plene funkciis kaj informis multegajn aktivulojn de organizoj partoprenantaj en ESF 2003 pri Esperanto kaj E-Movado. Gratulindas deĵorado de SAT, SAT-Amikaro, E-95, EDE en Saint-Denis, FET, JEFO, UFE, Norda Federacio de UFE, UEA, Kastelo Grésillon, Esperanta Civito en Parizo.

En La Villette, budo de mondcivitanoj eldonis flugfoliojn, inter kiuj Esperantan version kaj ankaŭ afiŝon en kiu estis Esperanto (dank'al niaj gesamideanoj Daniel Durand kaj Geneviève Charpentier. Almenaŭ centoj da diskutoj okazis kaj miloj da flugfolioj estis disdonataj.

Ankaŭ esperantistoj (verŝajne Cyrille Poullet kaj Guy Cavalier) partoprenis Liberecan Socian Forumon en Saint-Ouen.

Prelegserio okazis en "ĉerizejo" (Sidejo de Esperanto-France) kaj en la SAT-Amikarejo laŭ interkonsento inter FET-UFE-JEFO kaj SAT SAT-Amikaro, por ke estu kolizio inter la prelegoj.

Ĵaŭdon de la 18H00 ĝis la 20H00 okazis prelego de Wera Blanke pri ATTAC-Movado kaj Esperanto en la "ĉerizejo".

Vendrede de la 14h00 ĝis la 15h30 prelego de Jakvo Schram, prezidanto de la PK de SAT pri SAT kaj Sociaj Forumoj.

Vendrede de la 15h30 ĝis la 17h00 prelego de Vilhelmo Lutermano, respondeculo de "Diplomatia Mondo" en Esperanto.

Tiuj du prelegoj okazis en la SAT-Amikarejo.

Vendrede de la 18h00 ĝis la 20h00 prelego de Renato Corsetti, prezidanto de UEA, pri E-Movado kaj Sociaj Forumoj.

Sabate de la 11h00 ĝis la 13h00 prelego de Philippe Bérizzi pri Esperanto kaj anglusona premo. Ambaŭ prelegoj okazis en la "ĉerizejo".

Ĉiuj tiuj prelegoj estis altnivelaj kaj interesis la publikon. Ni aparte dankas Claude Nourmont, kiu tradukis la prelegon de Renato Corsetti.

Okazis ankaŭ prelegoj en aliaj lokoj organizitaj de E-95 kaj EDE, en kiuj esprimiĝis Oszkar Princz, Christian Garino kaj Profesoro Rizzo.



*Stando de Esperanto-Demokratio-Eŭropo* *Foto: H. Masson*

Malfeliĉe estis kolizio kun la pli supraj programeroj, ĉar ili estis en oficialaj programeroj de ESF kaj ESF decidis pri la lokoj kaj horaroj. Tiuj programeroj estis kostaj, sed allogis ankaŭ neesperantistojn.

Sabaton posttagmeze manifestaciis

trideko da esperantistoj en du grupoj. La unua staris kun granda banderolo fabrikita de René Ballaguy por SAT sur Placo Bastilo ĉerande de la manifestacio, por ke ĉiuj vidu Esperanton kaj la dua, ritme kantanta, partoprenis marŝade de Respublika Placo ĝis Placo de Nacio tra Bastilo kun grandaj buntaj literoj "Esperanto".

*Vincento Charlot*

# *PRELEGOJ DE ESPERANTISTOJ DUM ESF*

Parizo, la 14-a de novembro 2003.

Hodiaŭ okazis krom la disdonado de flugfolioj kaj informo pri Esperanto dum la Eŭropa Socia Forumo, pluraj prelegoj en sinsekve la Esperanto-centro de SAT-Amikaro kaj poste en la centro de UFE.

Partoprenis al ĝi kelkaj dekoj da homoj. Traduko estis antaŭvidita. En la ejo de SAT-Amikaro, Vincento Charlot faris la tradukon. En la ejo de UFE kamaradino Claude Nourmont tre lerte kaj kapable faris la laboron.



*Kadre de ESF, en la nova sidejo de SAT-Amikaro, kamarado Jakvo Schram prelegis pri Esperanto kaj internacia solidareco.*

*Foto: K. Barkoviĉ*

La unua prelego estis de Jakvo Schram, prezidanto de Plenum-Komitato de SAT. Li prelegis pri la nepra bezono de "Universala Lingvo" kiu ne nur estas plej facile lernebla, sed ankaŭ havas la kvaliton de ĉiu granda lingvo rilate vorto-stokon kaj uzeblecon, en la strebado al internacia solidareco. Li substrekis ke pro manko de internacia solidareco, tro da homoj suferas malriĉecon kaj ke manko de internacia solidareco estas certe la ĉefkaŭzo ke iu malgranda grupo povas havi la mondan potencon.

Vilhelmo Lutermano, iniciatinto de "Le Monde diplomatique-eo" skizis la historion de la fondiĝo kaj posta evoluo, ne nur de la originala franca "Le Monde diplomatique", sed kiamaniere iom post iom aliaj lingvaj grupoj komencis kunlabori kun ĉi tiu gazeto, kiu havas la pravan reputacion ke ĝi estas plej verŝajne, la plej objektiva gazeto kiu ekzistas. Vilhelmo parolis pri la paŝoj kiujn li faris por zorgi ke ankaŭ Esperantio povas legi ĉi tiun gazeton en la propra lingvo. Reprezentanto de "Le Monde diplomatique" partoprenis la aranĝon en SAT-Amikara sidejo.

Jakvo Schram kaj Kreŝo Barkoviĉ (ĝenerala sekretario de P.K. de SAT) promesis subteni la iniciaton de "Le Monde diplomatique en Esperanto", projekto kiu plene akordiĝas kun la statuto de SAT.

Intertempe "Le Monde diplomatique-eo" havas jam 12 kunlaborantojn, sed daŭre serĉas aktivulojn, kiuj sufiĉe bone regas Esperanton por helpi en tradukado de tekstoj.

Ĝis nun LMD-eo aperas nur sur la paĝo < http://eo.mondediplo.com/ > de interreto, sed oni revas ke oni iam povu eldoni paperan gazeton, konforman al la originala.

En la tre pitoreska sidejo de UFE, oni devis atendi kelkajn minutojn ĝis la fino de la kurso pri Esperanto (ĉiam estas korvarmiga vidi ke kursoj de Esperanto krom interreto daŭre havas sukceson en lokaloj kie la lernantoj fizike ĉeestas) antaŭ ol ni povis aŭskulti la prelegon de Renato Corsetti. Renato en sia prelego eksplikis kial membroj de UEA sen problemoj povas partopreni al eventoj kiel Eŭropa Socia Forumo. Li komparis kelkajn landojn kun malsamaj kulturoj, kie en unu lando aferoj estas tute normalaj kaj ke la sama afero en alia lando alvokas protestojn.

Renato parolis per la konata elokventeco al li kutima, kaj la ĉeestantaro vere ĝuis la paroladon de la prezidanto de Universala Esperanto Asocio.

En la tempo por fari demandojn mi bedaŭrinde devis kuri por kapti la trajnon reen al Antverpeno.

En SAT-Amikara sidejo, Claude Longuépée, la prezidanto de UFE iom skizis la planojn, kiujn UFE havas rilate feston kiu estas planita por 2005 en Francio en la sama loko kie en 1905 okazis la unua Universala Kongreso de Esperanto. Se mi bone komprenis Claude, ĉiuj esperanto asocioj kiuj havas sidejon en Francio kunlaboras por sukcesigi la eventon. Do ne estos festo de neŭtraluloj aŭ ne-neŭtraluloj, sed granda festo de Esperanto kaj esperantistoj. Jam nun metu en vian agendon: Pasko 2005, Bulonjo-ĉe-Maro.

Mi reiris hejmen sufiĉe kontenta. Realisme ni devas kalkuli pri la forto kiun Esperanto- movado nun havas, kaj ne kalkuli laŭ ne realigeblaj dezirimagoj de kelkaj revuloj kiuj iom vivas ekster la realeco.

Esperanto pere de FET, UFE, SAT-Amikaro kaj SAT partoprenis videble al Eŭropa Socia Forumo. Jes ni evidente povas ĉiam esti pli multnombraj kaj pli aktivaj dum ĉi tiuj eventoj, sed kiel dirite, ni ne perdu realismon kaj tiam mi povas diri nur ke en Parizo oni denove povis vidi ke Esperanto ekzistas, pli eĉ, ke Esperanto vivas kaj utilas.

*Jakvo*

LE MONDE diplomatique

*Kiel vi jam certe estas informitaj, en la reto nun aperas esperanta eldono de konata franca revuo "Le Monde diplomatique", kiu enhavas ĉiam tre interesajn artikolojn kaj politikajn analizojn. Vi povas legi ĝin per la adreso - http://eo.mondediplo.com/. Ni reproduktas artikolon el la novembra numero pri Bolivio.*
*La redakcio*

# Bolivio

de Ignacio RAMONET

Ĝi estis perfekta demokratio. Ĉu ĝi ne respektis la du fundamentajn homrajtojn : gazetaran liberecon kaj politikajn liberecojn ? Ke la rajto pri laboro, la rajto pri loĝejo, la rajto pri sano, la rajto pri edukado, la rajto pri nutraĵo kaj tiom da pliaj rajtoj tute same fundamentaj tie estis sisteme tretataj, tio, ŝajne, neniel makulis la « demokratian perfektecon » de tiu regno.

En Bolivio, lando kun apenaŭ 8,5 milionoj da loĝantoj disponanta pri unu el la plej riĉaj subgrundoj de la planedo, manpleno da riĉuloj akaparas la riĉaĵojn kaj la politikan potencon jam de ducent jaroj, dum 60 % de la loĝantoj vivas sub la sojlo de malriĉeco. La indianoj - la plimulto - restas diskriminaciataj, la infanmortado atingas maldecajn kvotojn, la senlaboreco estas endemia, la analfabetismo dominas kaj 51 % de la homoj ankoraŭ ne disponas pri elektro. Sed tio ne modifas la esencon : temas pri « demokratio ».

Do, kiam la 11-an kaj 12-an de oktobro 2003, laŭ ordono de la prezidanto Gonzalo Sanchez de Losada, la armeo pafas per peza maŝinpafilo al la manifestaciantoj kaj kaŭzas kelkajn 60 mortojn kaj centojn da vunditoj [1], s-ino Condoleezza Rice, konsilisto de la usona prezidanto, parolante pri tiu ribelo kaj direktante sin al la membroj de la Interamerika Gazetara Societo (IGS) kunveninte en Ĉikago, deklaras ke Vaŝingtono avertas la manifestaciantojn ( !) kontraŭ « ĉia provo perforte renversi demokratie elektitan registaron » [2]

Oni memoras ke, la 11-an de aprilo 2002, kiam s-ro Hugo Chávez, demokratie elektita prezidanto de Venezuelo, estis dum momento renversita de la militistoj kiujn subtenis la mastraro kaj la amaskomunikiloj, Vaŝingtono urĝe agnoskis la puĉistojn kun la mensoga preteksto ke s-ro Chávez « pafigis kontraŭ sia popolo »...

« La buĉisto », kiel la bolivianoj nun nomas s-ron Sanchez de Losada, rifuĝis al Miamio [3], la 17-an de oktobro, sen ke Usono intencas akuzi lin antaŭ ia ajn tribunalo pro krimoj kontraŭ homaro.

Kial ĝi faru tion ? Ministro pri planado de 1986 ĝis 1989, s-ro Sanchez de Losada, konsilita de la ekonomikisto Jeffrey Sachs, submetis sian landon al « ŝokterapio », kiel deziris Vaŝingtono - politiko kies sekvo estis la maldungo de dekmiloj da salajruloj en la ŝtata sektoro. Dum sia unua mandato (1993-1997), tiu ultraliberala prezidanto, fariĝinte unu el la plej riĉaj homoj de sia lando, akceptis, daŭre sub premo de Usono, apliki programon de elradikigo de la kokao, kio sekvigis la ruiniĝon de centmiloj da kulturistoj, sen ajna alia solvo por supervivi, kiuj estas de tiam en konstanta stato de ribelado. Li ankaŭ privatigis, favore al precipe usonaj firmaoj, la tutan havaĵon de la ŝtato : fervojojn, minejojn, nafton, elektron, telefonon, flugkompaniojn, akvon.

La privatigo de la akvodistribuado en la urbo Koĉabambo [4] favore al la usona entrepreno Bechtel (unu el la grandaj profitantoj de la tutprivatiga programo de Irako kiun gvidas nun la okupaciaj aŭtoritatoj) provokis, en aprilo 2000, ribelon kaj finiĝis per foriro de Bechtel, cedo de la registaro kaj reŝtatigo de la akvo.

Dum tiuj du konfliktoj, tiu de la kokao-kulturistoj kaj tiu de Koĉabambo, venis sur la scenejon eksternorma popola gvidanto : Evo Morales. Kvardek-du jarojn, ajmara-indiano, aŭtodidakto, sindikata gvidanto. Li gvidas de preskaŭ dudek jaroj la plej postuleman sektoron, tiun de la kamparanoj ruinigitaj per la elradikigo de kokao.

En Latinameriko kaj ĉe la alimondistoj, s-ro Evo Morales, ĉefa figuro de indiĝena movado kiu montriĝas kun eksterordinara forto en Ekvadoro, en Peruo, en Ĉilio, en Paragvajo, fariĝis tre populara persono. Kun alia indiana gvidanto, Felipe Quispe, de la Movado Indiĝena Pachakuti (MIP), li kaj lia organizo, la Movado al Socialismo (MAS), faris la ofensivon kontraŭ la novliberala politiko de s-ro Sanchez de Losada kaj de ties

socialdemokrata aliancano, s-ro Jaime Paz Zamora. Politiko kiu, pere de grupo de multnaciaj konzernoj, celis senposedigi la landon je ĝiaj gasrezervoj forvendante ilin al Usono kaj kiu, lastinstance, provokis la eksplodon.

La « sufiĉas » de la boliviaj indianoj fondiĝas sur jarcentoj da historia sperto. La eksportado de la naturriĉaĵoj (arĝento, stano, nafto) neniam plibonigis la situacion de la malriĉuloj kaj neniam ebligis modernigi la landon. Kiel en Ekvadoro en januaro 2000 kontraŭ la prezidento Jamil Mahuad, en Peruo en novembro 2000 kontraŭ la prezidento Alberto Fujimori, kaj en Argentino en decembro 2001 kontraŭ la prezidento Fernando de La Rua, la bolivia loĝantaro, renversante s-ron Sanchez de Losada, forĵetas ekonomian modelon kiu, ĉie en Latinameriko, gravigis la korupton, ruinigis la loĝantarojn kaj akrigis la socialan marĝenigon.

Ignacio RAMONET

Tradukita de:
Vilhelmo Lutermano
el la franca

[1] International Herald Tribune, Parizo, 15-a de oktobro 2003. Sume, la nombro da viktimoj de la subpremo atingas kelkajn 78 mortojn kaj plurcentojn da vunditoj. Decas aldoni la 34 mortojn kaj 205 vunditojn de februaro, okaze de ribelo de la laboristoj kaj... de la polico kontraŭ apliko de imposto pri malaltaj salajroj. Neniu gazeto en Francio metis tiujn informojn al la titolpaĝo.

[2] Depeŝoj AP kaj EFE, 13-a de oktobro 2003.


[3] Miami, Teksaso, Usono.

[4]
Koĉabambo : orig.Cochabamba.

MONDE
diplomatique
*EN ESPERANTO*
***http://eo.mondediplo.com/***

Legu ĝin kaj diskonigu tiun novaĵon ĉirkaŭ vi. Tre interesaj informoj kaj analizoj ĉiumonate.

# SAT-anaj kunvenoj en Japanio kun k-do Kreŝimir Barkoviĉ



*2004*


Aviadila bileto nun fariĝis relative malmultekosta, sed la distanco inter Japanio kaj Eŭropo ankoraŭ estas tiel granda, ke neriĉaj homoj ankoraŭ ne povas facile pagi la vojaĝan koston. Kvankam SAT havis kaj havas certan nombron da membroj en Japanio, ĝis nun nur malmultaj povis partopreni en SAT-kongresoj, kiuj plejofte okazas en Eŭropo. Longaj ferioj ankoraŭ estas revo, kaj finance kaj tempe, por japanaj laboristoj.

Sed se estas malfacile multope viziti Eŭropon, male estas facile multope inviti iun al ni. Se ni invitos k-don Kreŝimir Barkoviĉ, kiu ĵus ricevis OSIEK-Premion pro sia lerta tradukado, ne nur SAT-membroj sed la tuta esperantistaro en Japanio bonvenigos lin kun admiro...

Ni estis pravaj. Ĉi tiu unua provo de SAT-anoj en Japanio alportis al ni kontentigan sukceson, dank' al la helpo de personaj amikoj de Kreŝo kaj aliaj Esperanto-organizoj kiuj akceptis lin kiel preleganton. Kaj tiel k-do Kreŝimir Barkoviĉ vizitis Japanion, invitite de japanaj SAT-membroj. Li alvenis Japanion en la 7a de oktobro 2003, kaj restis en la lando dum 3 semajnoj ĝis la 30a. Li vizitis en Japanio ĉefe Kansajan regionon (Kioto, Osako, Kobeo), Hokuriku-regionon (Kanazawa, Kaga), kaj Tokion.

Li partoprenis kaj prelegis pri la libro "7000 tagoj en Siberio" en la Japana Kongreso en Kameoka. Li prelegis kun tradukado japanen antaŭ neesperantistaj homoj, ankaŭ pri Kroatio kaj sia junaĝo, en Kioto-Zagreba Amikeca Asocio en Kioto, kaj pri SAT kaj Esperanta Civito en Japana Esperanto-Instituto en Tokio. Poste li partoprenis en la 3-taga SAT-ana kunveno kun SAT-membroj en Japanio, kiu okazis en la urbo Kaga apud Kanazawa. Lokaj SAT-membroj kaj esperantistoj gastigis lin en siaj hejmoj. Ankaŭ multaj esperanto-rondoj akceptis kaj bonvenigis lin en sian kunvenon. Li kontentige plenumis sian rolon propagandi por SAT kaj semi la semojn de Esperanto.

La projekto estis ebligita ne pro tio ke la japanoj estas riĉaj. Ja estas riĉaj




japanaj esperantistoj, kiuj pagus por reklami Esperanton en diverslandaj ĵurnaloj, sed tiauloj ne troviĝas bedaŭrinde en la japania SAT-anaro. Nun ni konstatas, ke ni, kunlaborante multope laŭ nia propra eblo, povas fari ion kion fari unuope ni ne povas. Eŭropo estas malproksima kaj veturkosto estas tro granda; malfacile estas havi feriojn kaj partopreni kongresojn. Sed antaŭ ol rezigni tiel, ni devas provi komenci ion eblan.

Sed, ne ĉiuj ricevas tian premion kiel OSIEK-Premion. Ĉu ĉi-foja projekto do estis escepta? Certe ne! Ĉiu aktiva SAT-membro havas sian fakon aŭ specialaĵon en la movado, ne nur literaturan sed ankaŭ socipolitikan, idean, sindkatisman, mediprotektan ktp. Se konsideri tiujn diversajn fakojn, ni povos fari similan projekton diversmaniere ne nur en Japanio sed

ankaŭ en aliaj landoj kunlabore kun aliaj homoj kaj movadoj ekster SAT kaj Esperantio.

Ni havas forton interŝanĝi pensojn kaj konatigi homojn per Esperanto.



*Dum japana kongreso - prelego pri "7000 tagoj en Siberio". Ĉeestis 170 kongresanoj.*

*Foto: Tahira Masako*

Al ni donis tiun konstaton la vizito de Kreŝo al Japanio.

*Viola Murasaki (kaj Tani Hiroyuki)*

## SAT-fakkunsido en la Japana Kongreso

Nia SAT-fakkunsido en la 90a Japana Kongreso en la urbo Kameoka estis la plej granda laŭ la nombro de ĉeestantoj post la dua mondmilito kaj eble en la tuta historio de SAT-ekzisto en Japanio. Ĝi okazis en la 12a de oktobro 2003. La kunsidon ĉeestis 28 gekamaradoj (kutime 10 ĝis 15), el kiuj 20 estis SAT-membroj, unu estis eksmembro kaj unu esprimis deziron aliĝi tuj post la kunsido. Kameoka estas la urbo, kie baziĝas Oomoto, la religia movado subtenanta Esperanton, kaj pro tio Japana Kongreso organizita de Oomoto emas havi relative multajn partoprenantojn, inkluzive grandan nombron da mobilizitaj oomotanoj. Sed ni ŝuldas ĉi-fojan nombron de niaj ĉeestantoj tute al k-do Kreŝimir Barkoviĉ, kiu faris allogan saluton en la malferma soleno de la kongreso.

Ni ja diskutis pri la financa stato de SAT, pri la planata fondo de LEA en Japanio, pri ESF, en kiu SAT partoprenos, kaj pri la Monda Socia Forumo. Sed la ĉefa celo de la fakkunsido estas interkonatiĝo kaj varbado, ĉar en limigita tempodaŭro estas neeble ĝisfunde diskuti pri io. Dank' al la trafa klarigo de k-do Kreŝimir Barkoviĉ kaj la kamaradeca etoso de la kunsido, kia ne oftas en aliaj krokodilantaj kunsidoj. Unu nemembro-ĉeestanto aliĝis post la kunveno kaj unu alia esprimis intereson aliĝi estontece.

En la 13a okazis prelego de Kreŝo pri "7000 tagoj en Siberio". La intereso de la publiko estis tiom granda, pli ol antaŭkalkulo, ke kolektiĝis 170 kongresanoj (preskaŭ triono de la tuta kongresanaro) en la halo por auskulti lian prelegon, malgraŭ ke samtempe okazis kelkaj aliaj paralelaj programeroj. Post la prelego forvendiĝis la tuta stoko de "7000 tagoj en Siberio" en la libroservo de la kongreso.

Notinde estas ke iu kongresano, kiu hazarde sidis apud Kreŝo en la kongresa bankedo, post interbabilado kun li, decidis aliĝi al la asocio. Lia vizito al Japanio ne nur semis la semojn de Esperanto kaj SAT, kiel Viola esprimis en la supra teksto, sed ankaŭ efikis por rekte varbi almenaŭ tri novajn membrojn al nia asocio.




*Dum la Japana E-Kongreso en Kameoka okazis tre sukcesa fakkunsido de SAT-anoj, cele al varbado kaj diskonigo de nia asocio. Sur la foto gekamaradoj: Tani, Barkoviĉ kaj Hirai.*

*Foto: Tahira Masako*

## SAT-ana kunveno en Kaga

La dua (21-jarcenta) SAT-ana kunveno en Kaga okazis post la Japana Kongreso dum la 24a-26a oktobro kun 11 partoprenantoj (Ie Harumi, Kreŝimir Barkoviĉ, Kawanisi Teturo, Alano Lauffenburger, Oikaŭa Jukiko, Tahira Masako, Tani Hiroyuki, Makino Tetu, Nisikawa Satoru, Nonomura Jo, Viola Murasaki).

Ni nomas ĝin "21-jarcenta", ĉar oni jam ne scias precize, kiom da fojoj ni kunvenis en la 20a jarcento. Sed ni volas ankaŭ enmeti en ĝi senton de




*Prelego de k-do Makino pri japana naciismo*

*Foto: Tahira Masako*

pri la neceso de la planata LEA. Ni esperas, ke ni vidos konkretan movon ĝis la venontjara kunveno.

Poste estis prelego de k-do Makino Tetu pri "Historio de naciisma ideologio en Japanio", kiun oni espereble povos legi en Sennacieca Revuo. Sekvis prezento pri Ĉielarka Marŝo de seksminoritatoj fare de k-do Nisikawa Satoru (*vidu novembran Sennaciulon -ndlr*). Ni pruntis komputilan ĉambron kaj li prezentis ankaŭ la TTT-ejon de LSG (Ligo de samsekemaj geeeperantistoj). Nokte k-do Alano Lauffenburger, kiu partoprenis en Porto Alegre, prezentis kaj alvokis partoprenon de esperantistoj en la venonta Monda Socia Forumo en Mumbai 2004. Laŭ lia propono ni decidis sendi nome de la Kaga-kunveno al ESF, MSF, kaj la

"la nova epoko". Kaga estas la urbo, en kiu Lanti loĝis en 1937 dum kelkaj monatoj. Li loĝis en tiama urbeto Jamaŝiro-maĉi, kiu nun estas parto de la urbo Kaga.

Ni mem kuiris por ŝpari elspezon kaj krei bonan etoson per kunkuirado. Tio sukcesis sed samtempe forrabis tempon, kaj kiam ni finis sinprezenton interkonatiĝan vespere de la unua tago, jam estis noktmezo.

La dua tago komenciĝis per la salutmesaĝo de k-do Jakvo Schram, kiun Tani voĉlegis. Matene de la dua kaj tria tagoj ni diskutis pri la SAT-statuto kaj fondota LEA en Japanio. Ĉar pro subita malsano forestis k-do Yamasaki Seikô, kiu estas la plej forta motoro por fondi LEA-on en Japanio, ni ne povis decidi konkrętan aferon, sed jam estis konfirmite, ke ĉiuj konsentas



preparata Japana Socia Forumo nian solidarecan mesaĝon. Ni parolis ankaŭ pri SAT-TTT-ejo, kiun Viola prezentis kaj petis de ni opiniojn kaj dezirojn.

Ni jam planas la trian kunvenon en aŭtuno 2004, kvankam detaloj ankoraŭ ne estas deciditaj. Partopreno de SAT-membroj el ekster Japanio estos tre bonvenaj.


Tani Hiroyuki





*Supre: prelego de k-do Alano Lauffenburger. Sube: en SAT-eca etoso*

*Foto: Nonomura Yô*

**El la SAT-sidejo**
**67 avenue Gambetta**
**FR-75020 Paris**

*SUKCESAN KAJ PACAN NOVAN JARON deziras al vi la P.K.*  *2004*





# NOVA P.I.V.

Lanĉoprezo :
**por Francio** 70 € + 4,64 € (afranko)
**por Eŭropo:** 70 € + 7,29 € (reg.afr.)
**ekster Eŭropo** :70 € + 10,40 € (reg. afranko).


HELPO AL LA ASOCIO
En Aŭstrio (€) Stuppnig 5,00;

NOVALIĜOJ

35.644 Gogman Lars, Letstigen 56, SE-128 48 Bagarmossen, Svedio
35.645 *Fujikawa Junko, Minamigaito 11, JP-619-0217 Kizu-tyo, Soraku-gun, Japanio
35.646 *Morishita Mineko, Koihigasi 2-34- 21, Nisi-ku, JP-733-0811 Hirosîma, Japanio

*SUBTENU VIAN ASOCION PER KUNLABORO, AKTIVECO KAJ FINANCE !*

*ESTONTO DE SAT DEPENDAS NUR DE VI!*

*SE VI KREDAS KE SAT ESTAS NECESA PARTO DE ESPERANTO-MOVADO*
*DIRU TION LAŬTE KAJ MONTRU PER VIA AKTIVA SUBTENO!*

## *FORPASIS VETERANO*



En Kyoto (JP) mortis la 27-an de oktobro 2003, en la aĝo de 106-jaroj, nia veterana membro, kamarado

**KAWAMURA Seiziro**
**matrikulo 27.399**

Li naskiĝis en 1896-11-09, esperantistiĝis ĉirkaŭ 1924, kaj aliĝis al SAT tuj post la mondmilito. Li estis prezidanto de regionaj Esperanto-Asocioj kaj Esperanto-rondo en Uzi. Kvankam li estis dumviva membro de SAT en siaj lastaj jaroj, li ĉiujare pagis mondonacon al SAT.
Estas konate ke antaŭ la dua mondmilito li instruis Esperanton al policanoj, kiuj poste supozeble utiligis ĝin por cenzuri esperantaĵojn kaj premi maldekstrajn esperantistojn. Sed laŭ li, li nur volis diskonigi la lingvon al policanoj, tiel ke ili sciu ke Esperanto ne estas danĝera lingvo.
Ni kondolencas al la familianoj kaj al SAT-en Japanio.

*****

En Lund (SE) mortis 94-jara, nia tre malnova membro, kamarado

**Olle OLSSON**
**(matr. 29.656)**

Ni kondolencas al familianoj kaj geamikoj.

## Memore al amikino

Suzanne Callas, 91-jaraĝa, diskrete forlasis la vivon, la 6-an de julio 2003, verŝajne sen sufero pro kora krizo. Ni perdis fidelan, kuraĝan, ne ordinaran amikinon, ĉiam preferanta solecon ol ŝafan sintenon. En SAT ŝi trovis sin hejme. Tie esperantistoj estas kvazaŭ familianoj. Al Esperanto ŝi pasie aliĝis. Por ŝi plej gravis ŝia humanista idealo, ŝiaj geamikoj. Ofte dolĉigis ŝian koron la beleco de la pejzaĝo kiun ŝi kutime kontemplis el sia hejmo.
Diskreta, ridetema, sentema ŝi estis kaj daŭre estos en la memoro, en la koro de tiuj, kiuj amis ŝin. Dankon al Suzanne por kio ŝi estis.

Nicole Déjean

# SAT Kulturpaĝo



redaktanto Cezar

## Karaj legantoj, karaj geamikoj,

en tiu ĉi monato oni festas en multaj landoj Kristnaskon, la tielnomatan feston de la amo. Kaj pri amo temas ankaŭ la ĉina teksto: "Ĝi kriegas: Kial? Pro kio tio estas tiel?", tradukita de la juna ĉino Nigra Okulo. La amuza teksto montras, ke al la amo ĉiam apartenas du, despli, se antaŭjuĝoj, nutrataj el realaj sociaj maljustaĵoj, malhelpas ĝin. La kaŝuban kristnaskokanton mi tradukis, ĉar min tre impresis, kion la kaŝuboj, slava popolgrupo en Kaŝubio en Pollando, farus, se Kristo estus naskita ĉe ili. La kristnaskan recepton kontribuis mia Donjo.

La esprimon "paca festo" oni ne uzas tiom ofte. Tio havas diversajn kaŭzojn. La plej grava estas tiu, ke apenaŭ pasis Kristnasko en la lastaj jaroj, kiam oni ne plu militis ie, kiam oni ne incitis ĝuste tiam iujn religiajn konfliktojn.

Iam mi vidis foton kun nigra homo sur strato, kiu tenas faskon da bananoj en la mano kaj almozpetan ladskatolon. Ĉirkaŭ sia kapo li havis afiŝan ŝildon kun foto de malsata akvoventra infano kaj la surskribo: "Pacon surtere por tiuj, kiuj satas."

Sed eĉ tio ne ĉiam pravas, ĉar la "paca festo" en riĉaj landoj, ofte ne estas tiel paca, kiel oni deziras ĝin. Ĝuste je Kristnasko kreskas la emo al kvereloj. Kiam la kandeloj finbrulis kaj la kantoj elsonis komencas la familiaj terapeŭtoj kaj telefonaj animzorgantoj sian laboron.

Sed ne nur por depresiaj kaj solaj homoj la "festo de la amo" estas problemo. Ankaŭ geoj ĝuste tiam kverelas pli ofte ol kutime. Kaj ju pli familioj provas estigi "harmonian" feston des pli verŝajne ili fiaskas pri tio. Ankaŭ nervozaj manaĝeroj kaj aliaj superaktivaj karieristoj ĝojas, se la festo estas fine finita kaj ili ne plu devas sidi trankvile hejme, kie ankaŭ ili pro enuo komencas kverelojn pri bagateloj.

Oni tamen ne tro kondamnu laŭtan fulmotondron sub la kristnaska arbo. Unu avantaĝon ĝi ja povas havi, se post la eksplodo de sentoj ekestas vera paca harmonio.

Mia edzino Donjo, nia nepo Vincent kaj mi mem deziras al vi ĉiuj ĝojan kaj pacan Kristnaskon kun ornamita arbo ĝis la plafono, kaj antaŭ ĉio, aliajn donacojn, kiujn vi vere bezonas! Kompreneble garnitajn per multaj kisetoj de viaj karaj! Tio estas ĉiam la plej grava, ĉu ne? Por ke la festo de la amo estu pli ol nur deviga renkontiĝo de la familianoj kaj sobra negoco por la komercistoj, kies varoj jam ekde septembro fanfarone kaj pompe elkrias- Nepre aĉetu min!

Laste ankoraŭ pripensinda konsilo de mi: Ne forgesu, ke viaj donacoj montras, kiu vi estas mem.

Via kulturredaktoro Cezar

**KULTURMOZAIKO**

Nova projekto: la SAT-kulturpaĝoj:

http://satesperanto.free.fr/

(alklaku la packolombon)

## Lunokeksoj kun nuksofarĉo

**Necesas**: 110 g da pulvorsukero * 1 kulereto da rumo * 160 g da faruno * 40 g da hakitaj nuksoj * 1 ovo * 30 g da butero

farĉo: 250 g da butero * 300 g da pulvorsukero * 3 supkulero da faruno * 1 ovo * 3 supkulero da kakaopulvoro * 100 g da hakitaj nuksoj * 100 g da sekvinberoj * 150 g da keksopecetoj * 50g da ĉokolado

**Preparo:**

1. Knedu la pastajn ingrediencojn, lasu kuŝi ĝin en frideta loko dum 30 minutoj, platruligu ĝin poste ĝis la dikeco de 2 aŭ 3 milimetroj, elpiku lunecajn pecetojn, baku la keksojn dum ses minutoj en bakforno ĉe 180 gradoj laŭ Celsio.

2. Fandu la buteron, enmiksu la pulvorsukeron, la farunon kaj ovon, poste aldonu la kakaopulvoron, la nuksojn, sekvinberojn kaj la kekspecetojn.

3. Surŝmiru en dikeco de kvar milimetroj la paston sur tabulo kun bakpapero. Malvarmigu ĝin en frideta loko dum 1 horo. Tiam elpiku el la pasto lunojn kaj metu ilin inter po du jam malvarmetajn keksojn.

4. Laŭplaĉe garnu la lunkeksojn per fandita ĉokolado.

Bonan apetiton deziras Donjo!

## *Kriegas: Kial? Pro kio tio estas tiel?*

La zebro profunde amas la cervinon, tamen ĝia amo estas rifuzita. La zebro kriegas: Kial? Pro kio tio estas tiel?
La cervido timeme respondas: Mia patrino diris, ke ĉiu, kiu havas tatuon, estas sentaŭgulo.

La pando profunde amas la cervinon, tamen ĝia amo estas rifuzita. La pando kriegas: Kial? Pro kio tio estas tiel?
La cervido timeme respondas: Mia patrino diris, ke ĉiu, kiu portas sunokulvitrojn, estas malica junulo.

La kokino profunde amas la anason, tamen ĝia amo estas rifuzita. La koko kriegas: Kial? Pro kio tio estas tiel?
La anaso timeme respondas: Mia patrino diris, ke ĉiu, kiu nomiĝas kokino, estas malbonulino.

La araneo profunde amas la formikinon, tamen ĝia amo estas rifuzita. La araneo kriegas: Kial? Pro kio tio estas tiel?
La formikino timeme respondas: Mia patrino diris, ke ĉiu, kiu enretas ĉiutage, ne estas bonkorulo.


La serpento profunde amas la testudinon, tamen ĝia amo estas rifuzita. La serpento kriegas: Kial? Pro kio tio estas tiel?
La testudino timeme respondas: Mia patrino diris, ke ĉiu viro, kiu ne havas sufiĉe da mono por povi aĉeti veston, ne estas bona viro.

La oranĝino profunde amas la pampelmuson, tamen ĝia amo estas rifuzita. La oranĝino kriegas: Kial? Pro kio tio estas tiel?
La pampelmuso timeme respondas: Mia patrino diris, ke ĉiu virino, kies vesto estas facile demetebla, ne estas bona virino.

La cifero 5 profunde amas la ciferon 1, tamen ĝia amo estas rifuzita. La cifero 5 kriegas: Kial? Pro kio tio estas tiel?
La cifero 1 honteme respondas: Mia patrino diris, ke mi ne povas kuniĝi kun tiu, kiu havas rondan ventron.

*el la ĉina esperantigis Nigra Okulo*

Rimarko: En Ĉinio, "kokino" kromnomo de prostituitino.



## *Kaŝuba kristnasko-kanto*

Se vi, knabo, en kaŝuba lando,
se vi estus do ĉe ni naskita!
Ne sur fojno estus vi kuŝinta,
sur lanugoj estus vi dorminta.

Ne en stalo aĉe vi kuŝintus,
ĉe la forno starus via lito.
La sinjoro pastro mem alkurus;
Li vin, kaj la panjon, tre
honorus.

Ni tre varme estus vin vestintaj!
Ĉapon portus vi ŝaffelan,
palton bluan el kaŝuba drapo,
pelte subŝtofitan, kun rubandoj.

Propran zonon ni vin donus,
por piedoj viaj ruĝajn ŝuojn,
belajn kaj per najloj firmigitajn!
Kiel reĝo estus vi vestita!

Kaj per manĝo ni vin
plenŝtopintus!
Je mateno blankan panon kun
mielo
kaj buteron, bonan stufitaĵon,
je tagmez' griaĵon, flavan
saŭcon.

Anseraĵon, tripojn kun
zingibro,
graskolbason kaj omleton oran,
kaj en kruĉoj la bieron fortan.
Kiom ni vin estus plenŝtopintaj!

Nian tutan koron ni vin donus!
Kaj ni ĉiuj fariĝintus piaj,
la genuoj niaj sin fleksiĝus,
kaj ĉielen la piedoj irus.

Kaj neniam plu grenejo brulus,
je dimanĉ' ne sangus kap'
ebria-
se vi, knabo, en kaŝuba lando,
se vi estus do ĉe ni naskita!

tradukis Cezar

*SAT-kulturo ne falas el la ĉielo ni faras ĝin!*




# 77-A SAT-KONGRESO BRATISLAVA (SK) 2004--08-14/21

**Organiza garantianto** : KAVA-PECH, kongresa kaj kleriga agentejo de Petro Chrdle, kunorganizanto: ESO, Esperanto-Societo Bratislava.

**Koresponda adreso:** KAVA PECH, Anglicka 878, CZ-25229 Dobrichovice. Tel: +420 257 712 201; fakso: +420 257 712 126; rete: info@kava-pech.cz; http://www.kava-pech.cz.

**OKK:** Petro Chrdle, Zdenek Pluhar, Jana Melicharkova, Jarmila Rechtorysova.

La 77-a SAT-kongreso okazos unuan fojon en Slovakio, precize en ĝia ĉefurbo Bratislava, kiu logas kaj pro sia beleco urba, kaj pro la konekto kun bela naturo: rivero Dunaj (Danubo), montetaro Malé Karpaty (Malgrandaj Karpatoj).

| **Kongreskotizoj (en Eŭroj)** | ĝis 31.01.04 | ĝis 30.04.04 | ĝis 30.06.04 | pli poste |
|---|---|---|---|---|
| SAT-membro | 55 | 65 | 75 | 85 |
| SAT-geedzoj (se ambaŭ) | 80 | 95 | 110 | 125 |
| SAT-junul(in)o ĝis 25 j. | 25 | 30 | 35 | 40 |
| Nemembro de SAT | 70 | 80 | 90 | 100 |
| Junula nemembro de SAT | 35 | 40 | 45 | 50 |

Infanoj ĝis 10-jaraj ne pagas kotizon.
La partoprenantoj el CZ, HU, PL, SI, SK ĝuas 30% rabaton. La partoprenantoj el AL, BG, RO, eksa YU (krom SI, eksa SU kaj ekster Eŭropo (krom Aŭstralio, Israelo, Japanio, Kanado, Korea Respubliko, Sud-Afriko kaj Usono) ĝuas 50 % rabaton.

**ATENTU : Personoj el landoj, kiuj bezonas enirvizon por Slovakio devas indiki tion antaŭ la 30-a de aprilo 2004. Pli poste ne plu eblos trakti tion.**

Kongresejo: Kiel kongresejo servos Kultura domo TRNAVKA en samnoma urboparto de Bratislava kaj parte ankaŭ la apuda hotelo PLUS.

---

Mi aliĝas al la 77-a SAT-kongreso en Bratislava (SK) kaj samtempe pagas/jam pagis la kongreskotizon laŭ la kotiztabelo EUR_______________per jena maniero :
* al la konto **s-kape** ĉe SAT
* al la konto **kape-p** ĉe UEA
* per SWIFT al la konto 2734847402227/0100 ĉe Komerĉni banka Praha
* per Eŭroĉeko (**ĉe lastaj du ebloj aldonante EUR 10 por la bankelspezoj**)


Nomo: Persona nomo: Naskiĝjaro: viro/ino

Kompleta adreso:

Tel.: Fakso: Rete:

Loko kaj dato: Subskribo:

# Konatiĝu kun la urbo kaj la lando de la venontjara kongreso



La 77-a kongreso de SAT okazos venontjare, de la 14-a ĝis la 21-a de aŭgusto en la ĉefurbo de Slovakio – ***Bratislava***. Kvankam la urbo troviĝas ekster la centro de la lando, ĉe ties okcidenta ekstremo, el la politika, ekonomia kaj kultura vidpunktoj ĝi estas senduba centro de Slovakio.

La urbo havas proksimume 450 000 loĝantojn, la teritorio de la urbo 367,5 km². La plej alta konstruaĵo – 200-metra – estas la televida turo, la plej alta domo en la urbo – la centro de Nacia Banko de Slovakio estas 111 m alta.

El la industrio nepre menciinda estas ĥemia industrio prilaboranta nafton (*Slovnaft*), fabrikanta grandkvante acidojn kaj industriajn sterkaĵojn (*Istrochem*) kaj preparanta derivaĵojn de kaŭĉuko (*Matador*). Krom ĉi tiu industri-branĉo gravas ankaŭ la maŝinkonstrua industrio (*BAZ* kaj *Volkswagen*), elektroteĥnika industrio (*Kablo, Tesla, Siemens*) kaj la fabrikoj por la produktado de nutraĵoj kaj vitraĵoj.



*Nova Ponto trans Danubo (Foto P. Chrdle)*

En la urbo estas lernejoj de ĉiuj ŝtupoj kaj ĉiuj studodirektoj. El la altlernejoj oni prezentu Universitaton de Komenio, Slovakan Teĥnikan Universitaton, Ekonomian Universitaton kaj du altlernejoj pri artoj. Al la universitatoj ligiĝas la centroj de sciencoj kaj esploro – la laborejoj de Slovaka Akademio de Sciencoj kaj pluraj esplorinstitutoj. La gravecon de la urbo en la kultura sfero emfazas precipe Slovaka Nacia Teatro, Slovaka Nacia Galerio, Slovaka Nacia Muzeo. Slovaka Nacia Filharmonio.

El la periodaj fakaj kaj kulturaj entreprenoj, kiuj okazas regule en la urbo, estas eĉ eksterlande konataj ekspozicioj de ĥemiaj produktoj *Incheba*, Muzikaj Festoj de Bratislava, Liro de Bratislava, ekspozicioj de floroj *Flora* ktp.

La centro de la urbo estas protektata kiel valora historia heredaĵo. Vizitindaj certe estas Kastelo de *Bratislava* kaj ruinoj de *Devín*, la gotika katedralo de sankta Marteno, la malnova urbodomo el la 14-a jarcento, pluraj palacoj.

Sed ne nur pro siaj politika, ekonomia, historia kaj kultura signifoj estas vizitinda la slovakia ĉefurbo. Ĝi situas en la bela natura loko, ĉe la kunfluejo de la riveroj Danubo kaj *Morava*, kontraŭ nordo protektata de la montaro Malgrandaj Karpatoj. La klimato de la urbo estas modera – averaĝa temperaturo estas +10,8 °C. La teritorio kiu vere logas al turismo.

La kongresanoj povos konatiĝi kun la urbo mem, sed ankaŭ kun ties ĉirkaŭaĵo, pere de ekskursoj, kiuj estos organizataj dum la kongreso. Dum la tuttagaj ekskursoj ili povos viziti la urbon kaj la kastelon ***Trenčín***, antaŭ jarcentoj eĉ ĉi tie estis sentebla la influo kaj potenco de la iama Romia Imperio, ili vidos la mondkonatan banlokon ***Piešťany***. Alia ekskurso prezentos al la partoprenantoj t.n. „Slovakian Romon“ – la urbon ***Trnava***, la kastelon ***Červený Kameň***, la urbetojn ***Modra*** kaj ***Pezinok***, kiuj estas krom alie konataj kiel centroj de vitkulturado. La belegan naturon de **Malgrandaj Karpatoj** oni povos ĝui dum la pieda tuttaga ekskurso. Certe estas multaj vidindaĵoj, oni devos nur elekti. Dum la duontagaj ekskursoj vizitos la partoprenantoj la kastelruinojn de la iama grava slava kastelo-fortikaĵo ***Devín***, aliaj duontagaj ekskursoj ebligos konatiĝi kun la atoma elektro-centralo ***Jaslovské Bohunice***, aŭ kun la admirindaj vorkoj sur Danubo - la akvobaraĵo kaj kanalo ĉe ***Gabčíkovo***.

OKK


# Kontraŭpersonaj minoj

De post 1998, kvar artikoloj jam aperis pri la sama temo en Sennaciulo. En la tri lastaj mi volis montri, ke eblas agi por la malarmado, eĉ en oficiala komisiono. Mi ne scias ĉu mi konvinkis kelkajn kamaradojn pri la ĝusteco de tia agmaniero, sed mi ĉiam daŭrigas mian laboron en laborogrupo de la «franca nacia komisiono por la elimino de kontraŭpersonaj minoj», ĉar tiu komisiono ne limiĝas je simpla kontrolo de l' detruo de stokitaj kontraŭpersonaj minoj. La komisiono plenumas duoblan funkcion de kontrolo kaj de vigleco, sed ankaŭ ĝi intervenas pri aferoj de senminigo.

## Kontrolo

Antaŭe mi skribis en julia-aŭgusta Sennaciulo de la jaro 2002, ke la Konvencio de Otavo kaj la franca leĝo rajtigas stokon de kontraŭpersonaj minoj por la senminigesploro kaj instruo de l' senminigopraktiko. La franca stoko estas 5 000 kontraŭpersonaj minoj («stoko 5 000»).

La komisiono kontrolas la elirojn de minoj el la «stoko 5 000», kaj la uzon de tiuj minoj ĝis iliaj detruoj. La minoj servas por multaj provoj : provoj por eksperimenti senminigmaŝinojn, por plibonigi la protekton de senminigistoj, por serĉi la enterigitajn minojn…



*Kamparano kripla pro mino.*

## Vigleco

Dum la du lastaj jaroj, la vigleco de la komisiono estis direktita precipe al la dubaj kontraŭtankaj minoj. La komisiono intervenis pri pluraj tipoj de minoj; tiuj intervenoj kondukis al:

- la franca armeo definitive forlasis la uzon de unu tipo de mino, ĉar la komando de l'eksplodo de tiu kontraŭtanka mino estis simila al tiu de kontraŭpersona mino; plie la daŭro de l' aktiveco de tiu mino ne estis kontrolebla.

- pri alia tipo de kontraŭtanka mino, la franca ministerio pri la nacia defendo entreprenis esploron por modifi la komandon de l' eksplodo tiamaniere, ke tiu kontraŭtanka mino ne ekplodu post nevola kontakto inter unu homo kaj la mino. La komisiono sekvos tiun studaĵon kaj la modifojn de minoj.

- la komisiono petis provojn pri la kontraŭtankaj minoj eksplodantaj pro l' variado de l' magneta kampo. La franca ministro pri nacia defendo ĝis nun rifuzis.

La forlaso de unu tipo de mino, la esploro por modifi la komandon de l' eksplodo de unu alia estas la konsekvencoj de l' ago de l' komisiono.

## Senminigo

Debato okazas en la komisiono inter la partizanoj de l' mekanika senminigo kaj de l' mana senminigo. La mana senminigo estas tre longa, tre danĝera por la seminigistoj, kaj tamen kelkaj NRO (Ne Registaraj Organizaĵoj) estas prefere favoraj al la mana senminigo.



*Aparato por mekanika senminigo*

Necesas konvinki, en la komisiono, la reprezentantojn de ministerioj pri l' supereco de l' mekanika senminigo antaŭ la mana senminigo por ke Francio fine entreprenu grandajn kampanjojn de senminigo en multaj landoj ankoraŭ minitaj.

## Traktato de Otavo

30.000.000 da stokitaj kontraŭpersonaj minoj estis detruitaj ekde apliko de l' traktato de Otavo. 132 ŝtatoj ratifis la Konvencion de Otavo, sed 48 ŝtatoj ne subskribis ĝin, inter kiuj Ĉinio, Rusio kaj Usono, kiuj estas permanentaj membroj de l' Konsilio de Sekureco de UN !

Eĉ se la monda stoko da kontraŭpersonaj minoj restas ankoraŭ impona, tamen oni povas ĝoji ke 30.000.000 da minoj neniam mortigos aŭ kripligos homon.

*André Weiss*